

INTERNACIA FERVOJISTO



ORGANO DE I.F.E.F.


INTERNACIA FERVojISTA ESPERANTO-FEDERACIO

32a jaro

Septembro-Oktobro 1980

N-ro 5

=====



REGENSBURG, la 33-a kongresurbo

KIU KONAS, KIU HAVAS SPESMILON?

Antaŭ la unua mondmilito la esperantistoj ofte uzis tielnomatan Spescn resp Spesmilon anstataŭ nacian valuton. Ĝi havis fiksan kurson. Unu spesmilo valoris ekzemple 2,5 francajn frankojn aŭ 2 germanajn markojn aŭ 1 rusan rublon.

Kiu povas sendi ekzemplaron de tia spesmilo aŭ bonkvalitan foton resp fotokopion de ĝi?

La Historio-Komisiono de IFEF bezonas ĝin por la planita broŝuro.

Krome ni serĉas membrokarton de la "Internacia Asocio de la Esperantistoj Fervojistoj" el la sama tempo.

Elŝpezojn ni kompensas.

Bv. sendi al la gvidanto de la komisiono laŭ la jena adreso:

Joachim Giessner,
An der Nicolaischule 3,
D-3420 Herzberg am Harz.



INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO

Sekretariejo: E Henning Olsen, Åderupvej 182, DK-4700 Næstved.
Redaktoro:
Guy Delaquaise, 52, rue L.-Gandillet, F-78420 Carrières/Seine.
Bankkonto: Provinsbanken, Konto 7353-350550, DK-9800 Hjørring.

33a KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO (IFEF) EN REGENSBURG (FR Germanujo)

15a - 21a de Majo



Kongresadreso:
33a IFEF-kongreso, Wiener Str. 121,
D-6000 Frankfurt (M) 70
Tel (0611) 65 73 65

Kongresejo:
Kolpinghaus St. Erhard,
Adolph-Kolpingstr.1, D-8400 Regensburg
Tel. (0941) 55 800.

Aliĝo

Aliĝiloj estas haveblaj per la landaj sekcioj de IFEF aŭ per la kongresadreso. La aliĝilo estu sendata al la peranto de la landa sekcio aŭ al kongresadreso. Samtempe oni ĝiru minimume la kongreskotizon al "Wilhelm Grass, Sonderkonto, Sachsenstr. 7, D-8620 Lichtenfels, poŝtĉekkonto n-ro 240 001-855. Postscheckamt Nürnberg, Bankleitzahl 760 100 85". LKK konfirmas la aliĝon kaj sendos la kongreskarton, kies prezento post la alveno en la kongresejo permesas la elliveron de la kongresdokumentoj.

Kongreskotizoj

Ĝis la 31a de Januaro 1981 (alveno de la mono) validas la sekvaj kongreskotizoj en germanaj markoj (DM):

- IFEF-membroj (fervojistoj, pensiuloj)	62,00 DM
- familianoj kaj junuloj (malpli ol 20 jaraĝaj)	31,00 DM
- aliaj kongresanoj	75,00 DM
- simpatiuloj (ili ricevos la kongresmaterialon)	20,00 DM

Ekde la 1-a de Februaro 1981 la kongreskotizoj altiĝos, escepte por simpatiuloj, nome al 92,00 DM por IFEF-anoj, 46,00 DM por familianoj/junuloj kaj 99,00 por aliaj kongresanoj.

Loĝigo

Kun la aliĝo al la kongreso estas mandata samtempe la tranoktebleco en la dezirita kategorio. La trafikoficejo de la urbo Regensburg konfirmos la rezervigon direkte al la kongresanoj. Po lito kaj nokto inkluzive de la matenmanĝo kaj servmono validas proksimume la sekvaj prezoj:

- en gastejoj (sen propra duŝo)	ĝis 24,00 DM
- en pensionoj kaj hoteloj	
2a kategorio	24,00 ĝis 40,00 DM
1a kategorio	40,00 ĝis 55,00 DM

Manĝoj

En la kongresejo oni povas partopreni la komunajn manĝojn kontraŭ antaŭe aĉeteblaj kuponoj.

Ekskursoj

Ekskursoj estu mendataj kun la aliĝo. Ili estas pagendaj plej malfrue post la alveno en la kongresejo. Dum la kongreso ekskursoj estas vendataj, se lokoj en la aŭtobusoj kaj ŝipoj estos ankoraŭ disponeblaj.

LKK ofertas

- aŭtobusan ekskurson al Falkenstein en la montaro Bavara Arbara tra la triumfa halego Walhalla inkluzive de kafo kaj kuko 16,00 DM
- aŭtobusan ekskurson al la tririvera urbo Passau kun rondveturo per ŝipo inkluzive de la manĝo 38,00 DM
- aŭtobusan ekskurson al la danuba urbo Kelheim kun ŝipveturo al la monaĥejo Weltenburg inkluzive de la manĝo 25,00 DM

Lingva instruado

Denove estos ebleco partopreni senkoste lingvan instruadon laŭ la direkta metodo, supozeble por komencantoj kaj progresintoj.

Germanlingvaj kongresanoj povas krome plenumi la Esperanto-ekzamenon laŭ la reguloj de la Germana Esperanto-Instituto.

LKK de la 33a IFEF-kongreso

JUNULARA FONDUSO DE IFEF

La junulara fonduso nun enhavas sumon proksimume 900 danajn kronojn, kaj de tempo al tempo bonkoraj membroj plialtigas ĝin.

La estraro volonte akceptos kaj kontribuojn al la fonduso kaj proponojn pri ĝejnuloj, kiuj meritas subvencion por partopreni iun Esperanto-arangon.

La kasisto

33a IFEF KONGRESO

PROVIZORA PROGRAMO

- | | |
|-----------------|---|
| Vendredon 15.5. | Alveno de la kongresanoj
Interkona Vespero |
| Sabaton 16.5. | Ekomena diservo
Inaŭguro
Komisionoj
Kant- kaj koncertvespero |
| Dimanĉon 17.5. | Okazo por aŭskulti la mondfaman ĥoron "Domspatzen" en la katedralo
Komitatkunsido (nepublika)
Duontaga ekskurso A al Walhalla kaj Falkenstein
Distra Vespero |
| Lundon 18.5. | Komitatkunsido (publika)
Fakprelego
Balo |
| Mardon 19.5. | Tuttaga ekskurso B al Passau (aŭtobuse kaj ŝipe)
Vespero libera |
| Merkredon 20.5. | Komitatkunsido (publika)
Komisionoj
Magia Vespero |
| Ĵaŭdon 21.5. | Ekskurso C al Weltenburg/Kelheim (aŭtobuse kaj ŝipe)
Kongresfermo |

Planataj ankaŭ estas urbgvidadoj kaj ŝipveturadoj trans la konatan danuban akvokirilon en Regensburg, krome lingvoinstruado kaj instruado por kursgvidantoj.

LITERATURA KONKURSO DE FERVOJISTOJ

LKK de la IFEF-kongreso havas ĉi jare interesan ideon: sub la nomo "La Verda Relo" oni proklamas

Literaturan Konkurson por originalaj kaj tradukitaj verkoj pri la fervojo.

La konkurson rajtas partopreni ĉiu esperantisto krom la membroj de la juĝkonisio kaj de la Loka Kongresa Komitato.

La proklamado de premiitoj okazos solene dum la sekvontjara kongreso de IFEF (15a ĝis 21a de majo 1981 en Regensburg).

Por la partopreno en la konkurso validas jenaj kondiĉoj:

La tradukitaj verkoj neniam aperis ie en presita formo.

La poeziaĵoj ne enhavu pli ol kvindek versojn.

La prozaĵoj ne ampleksu pli ol 4 paĝojn (formato A4, interlinio 2).

Ĉiujn kontribuojn necesas sendi en 4 ekzempleroj; ili estu klare tajpitaj.

Ĉiu partoprenanto en la konkurso rajtas prezenti po du verkojn en ĉiu branĉo: originala

kaj tradukita poezio resp originala kaj tradukita prozo.

Por tradukaĵoj oni devas aldoni kopion de originalo.

La konkursaĵoj devos atingi ĝis plej malfrue 31a de januaro 1981 la sekretariaton de la juĝkomisio:

Elfriede Kruse, Wiener-Str 121 D-6000 Frankfurt/Main 70, FR Germanio.

La jam starigita juĝkomisio (W. Brandenburg/Germanio, G. Gimelli jr/Italio kaj G. Sredić/Jugoslavio) prijuĝos ĉiujn kontribuojn kaj la plej bonaj estos publike prezentataj dum la IFEF-kongreso en Regensburg.

La konkurso celas disvastigi la fervojan mondon en la Esperanta kulturo.

La konata Esperanta eldonejo "La Literatura Foiro" deklaris principan pretecon aperi en libra formo la plej bonajn verkojn en aparta fervoja antologio.

Do, beletristoj, profitu vian bonŝancon:

helpu al IFEF disvolvi ankaŭ kulturan aktivecon per multnombra alsendo de viaj originalaj kaj tradukitaj verkoj pri la fervojo.

LA UNIVERSALA KONGRESO EN STOKHOLMO

La 65a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Stokholmo, Svedio la 2an-8an de aŭgusto 1980 kun 1807 partoprenantoj el 51 landoj.

La temo de la kongreso estis Diskriminacio: ĉefe lingva sed ankaŭ internacie ekonomia, rasa/etna kaj kontraŭ virina diskriminacio.

En la kadro de la kongreso estis ankaŭ Fervojista Kontaktkunveno vendrede la 8an de aŭgusto. Ĉeestis 16 personoj el 8 landoj.

Imre Ferenczy, Hungario, enkondukis kaj gvidis la kunvenon.

Kiel komenco li laŭtlegis raporton de komitato A de IFEF, Istvan Gulyas pri la okazinta 32a IFEF-kongreso en Het Meerdal, Nederlando.

Menabene, Italio pledis por vigligo de la movado. Li speciale emfazis la rolon de la Itala Parlamenta Grupo, kaj li pledis por fondigo de simila grupo en FR Germanio kunlige kun la IFEF-kongreso en Regensburg venontjare.

La sekr de IFEF Henning Olsen, Danlando, kiu ĵus venis al Stokholmo, speciale por nia kunveno, faris longan prelegon, en kiu li interalie tuŝis la lingvajn problemojn de FISAIC kun du aliaj lingvoj: franca kaj germana.

Estas hontiga afero, ke Svedio, Finnlando, Norvegio kaj Danlando (la Nordiaj landoj) estas la plej agemaj por subpremi siajn proprajn lingvojn pere de in-

struado kaj uzado de unu-du fremdaj naciaj lingvoj.

Tio estas diskriminacio - aŭ: Ĉu ĝi estas nur stulteco?

Li bedaŭris, ke la Varbado/informado-komisio, kiun ni havis ĝis antaŭ du-tri jaroj ne plu funkcias, nun kiam ili en pluraj landoj dungas relative multajn novajn fervojistojn.

Fine li esprimis la esperon, ke ĉiuj, kiuj estas fervojistoj aŭ povas influi al fervojistoj kunne agu por plifortigi IFEFon kaj per tio helpi al elimino de lingva diskriminacio, almenaŭ ĉe la fervojoj.

Zensuke Kusuda, Japanio, plendis pro diskriminacio de la japana lingvo en internaciaj rilatoj.

Antaŭ la milito ili havis fortan fervojistan movadon en Japanio, sed nun ĝi lamas bedaŭrinde, ĉar ili nun havas multajn junulojn inter siaj fervojistoj.

Ili nun planas fari kontakton kun Ĉinio en la venonta jaro por vigligi sian movadon.

Ĉeestanta virino, ne fervojistino, prenis la okazon danki al IFEF pro la bonegaj skisemajnoj, kiujn ili okazigas. Ŝi bedaŭris nur, ke la Svisaj Fariaj Somersmajnoj ne plu estas. Henning Olsen respondis, ke li provos, se eble, restarigi tiujn somersmajnoj.

Fine, Imre Ferenczy faris mallongan raporton pri la viglago inter la fervojistoj en Hungario.

Bertil Bengtsson

KIEL NI ALTIGU LA NIVELON DE NIA LINGVOSCIO?

(Resuma versio de la prelego

de MARJORIE BOULTON

en la IFEF-kongreso, 1980)

Ni unue demandi al ni mem, ki-
al ni altigu la nivelon de nia
lingvoscio? Ĉar la precizaj
procedoj dependas parte de ni-
aj motivoj.

Ni konas tiujn, kies sinteno e-
stas proksimume tia:

"Kial milacu min kaj perdi mia
tempo, por altigi la nivelo de
nia scio pri Esperanto? Mi ne de-
ziras igi Akademiano. Mi kore-
spondencias kun multaj plum-
anikoj kaj ni interŝanĝas post-
manon. Mi enĝojas la societ-
alan vivon de nia loka grupon
en mian urbon. Mi estas tuta
kontenta kaj mi havas pli gra-
vaj aferoj, al kiun decidi mi-
an tempon."

Ili parolas, ne Esperanton, sed
la rivalan internacian lingvon,
Esperanton. Nu, ĉiuj devas en
la vivo iom elekti; aliaj afe-
roj ja postulas nian atenton
kaj tempon. Se ni deziras, ke
Esperanto estu kiel eble plej
utila al la tuta nomaro, estas
versajne preferinde, ke iu uz-
as ĝin utile, kvankam ne tre
bone, ol ke ĝi restu neuzita.
Ni estu iom toleremaj; tamen,
estas tre bedaŭrinde, resti fuŝ-
esperantisto, se niaj cirkon-
stancoj kaj talentoj permesas
al ni progresi. Kaj kiom ajn da
indulgemio ni montru al aliaj,
ni memoru, rilate al ni mem, ke
multaj homoj mirinde venkas tre
malfacilajn cirkonstancojn, ĉar
ili sincere volas venki; kaj ke

talentoj kreskas, eĉ surprize,
se ni kultivas ilin. Fuŝesper-
antisto ne nur malmulte servas
Esperanton, kaj foje eĉ malser-
vas ĝin, sed tute ne ricevas de
ĝi la profitojn kaj plezurojn,
kiujn li povus ricevi.

Mi mencias unue kelkajn pli-
malpli universalajn motivojn
por plibonigi nian lingvoscion.

Unue, la celo de Esperanto es-
tas pli bona komunikado. Kvan-
kam elementa scio ebligas ian
minimuman komunikadon, ju pli
bone ni scipovas nian lingvon,
des pli bone ni povas komuniki
kun aliaj; kaj kun pli diversaj
personoj, pri pli diversaj te-
moj.

Ni eble kredus, ke du divers-
naciaj komencantoj povas ĝui
kontentigan korespondadon aŭ
konversacion sur malalta nive-
lo, kaj ke, se ili faras kelk-
ajn erarojn, ne gravas. Sed e-
rarantoj el du nacioj ne faras
la samajn erarojn! kaj ne sci-
as, kiajn erarojn la nacia lin-
gvo de la alia instigis.

Angla komencanto volas mencii
bufon, ne rigardas sian vorta-
ron, sed pro la influo de la
angla vorto toad skribas todon.
Sed eble tio kauzas, ke hispa-
no kredas, ke la edzino de la
anglo trovis en la ĝardeno tu-
ton (hisp. todo) - sed tutan
kion? Franco, ke ŝi trovis do-
maĉon (fr. taudis); kaj germa-

no eble kondolencos, ĉar ŝi tro-
vis la morton (der Tod)! Kaj ni
povas imagi la konfuzon, se es-
tas hispano, kiu volas skribi
ion pri bufo, kaj en Esperanto
uzas la hispanan vorton sapo!

Sur pli alta nivelo ni povas e-
rari, se ni pensas pri la sig-
nifo de iom internacia radiko
en la propra lingvo, kaj uzas
bonan esperantan rilatan radi-
kon, sed kun la senco-nuanco ne
de Esperanto, sed de nia prop-
ra lingvo. Ni povas, ekzemple,
misuzi akto, aktuala, dezerto
aŭ deserto, eventuala, glaso,
merkato, observi, pipo, popo,
slipo, strika. Ni memoru ĉiam,
ke korespondanto povas serĉi
vorton en vortaro, sed ne po-
vas mense retraduki nian Espe-
ranton en nian nacian lingvon,
por kompreni, kion ni intencis
skribi. Do, grava motivo estas
ke ni komprenu unu la alian ple-
ne.

Alia motivo estas, ke ni ne te-
du aliajn! Ĉiu el ni iam estis
komencanto, kaj ofte estas de-
vo de sperta esperantisto, mon-
tri paciencon kaj indulgemon,
kiam komencanto fuŝas, balbut-
as, hezitas.

Nu, mi penas al komencanto es-
ti afabla kaj kuraĝiga; sed ki-
am mi post kvin jaroj renkont-
as la saman komencanton, aŭ de-
vas decidi ankoraŭ fuŝajn le-
terojn, mi emas protesti. "Ĉiu
devas iam komenci, sed neniu
rajtas ĝismorte komencadi!" kaj
tro da "eternaj komencantoj"
tre malaltigas la nivelon de
kulturo kaj aktivoj en ia gru-
po - aŭ internacia kongreso.

Se ni serioze ŝatas Esperanton,
ni havu etan sloganon:

"Ne estu nur samideanoj; estu
samlingvanoj!"

Pli egoisme; ju pli bone ni sci-
povas la lingvon; des pli ni
povas utiligi ĝin - por vojaĝi,
skribi al fak-delegitoj pri ni-
aj fakaj aferoj, ĉeesti kongre-
sojn, legi interesajn librojn,
viziti, memfide akcepti vizit-
antojn, servi nian ŝatokupon aŭ
kolekton, k.t.p.

Ni ankaŭ savas nin de misjuĝoj
kaj eĉ malĝentilaĵoj. Mi memo-
ras germanon, kiu diris al mi:
"Vian Esperanton estas ne guta,
mi ne kompreni vian anglujan
dialekto." Japana komencantino
iam riproĉis Julion Baghy: "E-
stas telule malfacile komple-
ni vi, ĉa' vi palolas kun telule
folta hungala akcento!" Sperta
esperantisto komprenas, ke pre-
skaŭ ĉiuj el ni havas etajn na-
ciajn trajtojn en la elparolo,
sed facile aŭdas ĉiujn, ne nur
samlandanojn, kies akcento es-
tas tiu, kiun likutimas aŭdi!
Nescianto ofte akuzas francon
pri "francismo", hungaro pri
"hungarismo", kiam la frazo e-
stas tute internacia, aŭ paro-
las pri "neologismo", kiam iu
uzas eĉ zamenhofajn vortojn,
kiujn la nescianto hazarde an-
koran ne konas.

Ni ellernu, ankaŭ, por ke ni ne
malpropagandu. Mi plurfoje ren-
kontis homojn, kiujn tiel nomi-
taj esperantistoj forpelis de
Esperanto. Antaŭ multaj jaroj,
mi mem naŭziĝis kaj preskaŭ for-
lasis Esperanton pro fuŝado kaj
krokodilado en nacia kongreso.
La plej promasplena esperantis-
tino, kiun mi iam ajn instruis,
tuj forlasis Esperanton post
vizito al loka grupo de nekom-
petentuloj.

Neniu faros brilan laboron sur ĉiu kampo, sed eble iu havas ian apartan ambicion.

Tiu, kiu deziras instrui Esperanton al aliaj, nepre laboradu por konstante plialtigi la nivelon de sia scio. Malbonaj instruistoj ofte mallogas lernantojn. Instruisto devas vere bone scipovi la lingvon. Eble alia deziras iĝi impona oratoro, kiel Leo Belmont, Privat, Lapenna, Auld, Tonkin. Alia volas traduki ian majstroverkon el la nacia lingvo - aŭ raportojn pri fervojistaj problemoj. Estas tre facile, traduki ion en Esperanto nebone; sed bona traduko ne legiĝas kiel lernanta tasko, kaj postulas bonan scion.

Kiel ajn aktoro kapablas montri emociojn kaj vere eniri fremdan personecon, line utilas, se oni ne aŭdas la vortojn, li stumblas meze de frazoj, ellasas akuzativojn kaj fuŝas la lingvan parton de sia tasko.

Esperanto estas bonega lingvo por la poezio. Sed neniu kreu, ke poeto nur rapide skribas kelkajn sent-esprimojn kaj tajpas ilin en mallongaj linioj. Eĉ por fari etajn ŝercajn rimaĵojn bone, ni bezonas edukitan lingvosenton kaj mendisciplinon. Iam la fama pentristo, Joshua Reynolds, faris belan pentraĵon tiel rapide, ke aliaj miris. "Kiom da tempo vi bezonis, por pentri tion?" iu demandis. "Tridek jarojn!" li diris, kaj tiel estas kun ĉiu arto. Simile, se vi deziras verki romanon, novelojn, eseon, ion ajn, vi devos pene lerni la metion.

Eble vi deziras diskonatigi ion inter esperantistoj; se jes,

memoru, ke malbona lingvaĵo tre eble malpropagandos vian sferon, sugestante, ke la ismano ne estas tre inteligenta.

Eble vi deziras servi la Movadon kiel organizanto ie. Se jes, vi bezonas multajn talentojn kaj virtutojn ne lingvajn. Sed organizanto, kiu ne povas klarigi ion pri Esperanto al ĵurnalisto, prezenti prelegonton, danki preleginton, instrukcii pri aranĝo, skribi protokolon, prezidi kunsidon, verki raporton, bonvenigi eksterlandanon, ne estos tre utila.

Ni turnu nin al kelkaj praktikaj preskriboj. Unue, jen kelkaj rimedoj por tiuj, kiuj havas specialajn celojn. Se vi deziras instrui, nepre poluru vian scion pri nia grammatiko kaj lingvaj kutimoj, ĝis ĝi brilas. Estas vera misfaro, instrui erarojn! Se eble, ĉesu ian kurson pri la Cseh-metodo; ĝi ne estas la sola bona metodo, sed donas valoregajn ideojn pri instruaj metodoj. Studu diversajn lernolibrojn; ekzistas bonegaj, banalaj, eĉ malbonaj. Se vi instruos en lernejo, kiel eble plej larĝe studu porinfanajn librojn; kaj ĉiuokaze, iĝu kompetenta por konsili pri leg-materialo. Du aparte utilaj libroj estas Esperanto kaj lernejo (1959) kaj Metodiko de la Esperanto-instruado (1970).

Tiu, kiu deziras iĝi oratoro, nepre legu kaj relegu almenaŭ la praktikan parton de Retoriko, de Ivo Lapenna. Studu elstare bonajn paroladojn, ekzemple tiujn (presitajn) de Zamenhof, Lapenna, kaj multajn presitajn en la gazetoj. Estas valore, analizi tiajn paroladojn,

kaj demandi al si, kial ili efikas.

Sed oni ne iĝas oratoro nur per legado; necesas plibonigi sian elparoladon kaj ĝenerale ekzerci sin. Diskoj kaj sonbendoj helpas nin. Kaj parolul eĉ se unue al vi mem en aparta ĉambro, poste al loka grupeto oni ne naĝas ekster la akvo.

Tiu, kiu deziras traduki, nepre serioze kaj humile pripensu la tradukan arton, ĉar multaj, kiuj tradukis, ne havis sufiĉe severajn kriteriojn. Bona traduko trovas la plej proksimajn ekvivalentojn por redoni la formon de la verko, la precizan enhavon, laŭeble la detalajn nuancojn (ekz. ne ruĝa se devus esti skarleta), la stilon, kaj ian specialan ornamaĵon, ekzemple ian vortludon. Tradukemulo peni por pligrandigi sian vortostokon kaj pli bone kompreni nuancojn. Alia tre utila ekzerco estas, preni vere rekomendindan tradukon, ekz. de Zamenhof, Kalocsay, Auld, Rossetti, Bernard, kaj detale kompari ĝin kun la originalo.

Por la aktoro ekzistas multaj konsiloj, kiuj estas sufiĉe universalaj; kaj rigardi bonan aktoradon en iu ajn lingvo estas instrua. Sed specialaj lerniloj por tiu, kiu volas aktori en Esperanto estas diskaj kaj sonbendoj kaj ĉeestado de prezentadoj en Esperanto.

Al tiu, kiu volas fariĝi poeto, mi konsilus, legu multajn bonajn poemojn; studu ekzemple la Esperantan Antologion. Ankaŭ nepre legu, relegu kaj uzu la konsultlibron Parnasa Gvidlibro - ĝi helpas, eĉ por verki nur etajn amuzajn poemojn. Por

fariĝi verkisto de iu ajn speco, legu jam rekonitajn bonajn verkojn en via fako. Ne imitu - valora verkisto parolas por si mem, ne per la buŝo de alia; sed lernu kriteriojn kaj studu esprim-rimedojn. Tre gravas por ĉiu verkisto la vortostoko kaj la grammatiko. Kaj tiu, kiu volas verki aŭ prelegi aŭ diskuti pri iu faka temo, skiru la vortaron de tiu fako.

Organizanto nepre speciale studu la historion de la Movado kaj la Jarlibron de UEA; kaj aparte al organizanto mi rekomendas libron, rekomendindan al ĉiu esperantisto: Esperanto en Perspektivo. Bona organizanto konsciencie atentigas ĉiutagajn detalojn; sed li eĉ ŝi komprenu pri grandskalaj rilatoj, kaj pri la mirakloj de kontaktoj kaj kunlaboradoj, kiujn Esperanto jam nun ebligas.

Sekvas kelkaj ĝeneralaj konsiloj, validaj por ĉiuj.

Por plibonigi nian scion, nidevas ekzerci nin. Kaj jen utila eta averto; pro faktoroj, en la psikologio de la memoro, kaj de lernoprocedoj, kvaronhoro da ekzercado ĉiutage pli bone efikas, ol horo kaj tri kvaronoj ĉiun mardon. Mi konsilas al ĉiu komencanto kaj progresanto: studu Esperanton ĉiutage, se nur dum dek minutoj - se vi nur aŭskultas sonbendon dum vi vestas vin aŭ aranĝas viajn harojn. Ne kuraĝigu vian forgesilon!

Ĉiu povas pripensi tri grandajn rimedojn por plibonigi nian scion:

1. LEGU. 2. SKRIBU. 3. PAROLU.

Post multjaraj spertoj mi aldo-

nos:

4. KONTROLU. 5. SERVU.

1. LEGU.

La ajn legado pli helpas, ol nenia legado. Se vi legas nur facilajn, malpezajn verkojn, vi pli kaj pli alkutimiĝas al la vortoj kaj kutimoj de la lingvo; via legado rapidiĝas; vi komencos iom pensi en Esperanto. Sed, kiam eble, eklegu pli malfacilajn librojn - streĉu vin! Se, kiam ni legas, ni serĉas en vortaro ĉiun vorton, kiun ni ne konas, ni pligrandigas nian vortostokon. Estas bone havi notlibron por novaj scioj.

Estas grave, ke esperantistoj laŭeble aĉetu bonajn esperantajn librojn - alie, oni ne povos eldoni ilin! Sed estas aliaj rimedoj por legemuloj. Ĉiu loka grupo devus havi grupan bibliotekon, eĉ se temas nur pri ia librokesto. Sed estas bone, ke anoj regule pruntu librojn kaj diskutu pri ili. Kaj en multaj landoj, publikaj bibliotekoj akiros stokon de esperantaj libroj, se sufiĉaj homoj montros intereson.

Kelkaj legaj ekzercoj estas aparte valoraj:

a) Legu tradukon de verko, kaj komparu ĝin kun la originalo: rigardu la esprim-rimedojn, la problemojn kaj solvojn.

b) Laŭtleĝu en grupo; ĉar, por laŭtleĝi, oni devas ne nur vidi, sed vere rigardi; oni samtempe ekzercas sin pri elparolo kaj parolado; la komencanto povas lerni de aliaj; estas sento de kolektiva kunlaborado; oni povas diskuti pri io interesa, laŭtleĝi dramon estas bo-

nega ekzerco.

c) Legu, kaj noti pri via legado, ekzemple, resumu, en Esperanto, la enhavon de iu libro.

d) Ne forgesu legi la verkojn de Zamenhof, niajn modelojn, kaj ankaŭ ion aktualan, kie ordinara nuntempulo esploras nuntempan stilon kaj vortaron. Mi aparte rekomendas la tre interesan kaj profesiecan gazeton MONATO. Ni pli ofte bezonas vortojn kiel televiziilo, atombombo, komputero, antibiotiko, eserografio, kaj eksterlandajn vortojn kiel igvano, tatamo, gnuc, manioko, kiujn Zamenhof ne uzis, ol kelkajn vortojn, kiujn li elpensis ĉar tiutempe li bezonis ilin, kiel vojevodo, jesaulo, vokto, pudo; ni tenu unu piedon en la historio, la alian en la nuntempa mondo.

e) Kaj foje ni turnu nin de romanoj kaj antologioj, gazetoj kaj dramoj, por relegi nian gramatikon aŭ pli bone esplori nian vortaron. Mi mem povas diri, ke nuntempe la legado, kiu plej konstante helpas min plibonigi mian lingvoscion, estas mia konsultado en la Plena Ilustrita Vortaro. Ĉi estas trezorejo ne nur de vortoj, sed de precedencoj kaj esprim-rimedoj.

2. Skribu.

Faru ekzercojn - el iu lernolibro, en ia kurso. Faru traduketojn. Mi aparte rekomendas Paŝoj al Plena Posedo, de William Auld, por vere pensigaj ekzercoj. Skribuletojn al plum-amikoj, precipe al amikoj, kiuj ne scipovas vian nacian lingvon, tiel ke vi ne povos helpi vin per krokodilado. Ĉiam, skribante, restu kiel eble plej

konscia pri la ricevonto. Jes, vi komprenas vian leteron; sed ĉu Kuame en Afriko aŭ Atuk en Gronlando komprenos ĝin? - jen la demando!

3. PAROLU.

Ni neniam lernos paroli Esperanton flue, sole kaj en silento. Se home eble, ni partoprenu ian grupan vivon. Kaj estas grave, ke en ĉiu Esperanto-klubo, ĉiu eta grupo, la anoj parolu Esperanton inter si dum almenaŭ granda parto de la tempo. Ideale, ni parolu nacilingve tie, nur por certigi, ke veraj komencantoj aŭdis ian gravan informon, ekz. pri la venonta kunveno; aŭ por klarigi ion pri Esperanto, ekzemple iu problemo gramatika, kiu perpleksigas iun.

Se tute ne estas eble partopreni la vivon de ia grupo, parolu al vi mem, instru familia non, insultu la katon esperante, korespondu per sonbendoj, konversaciuj telefone

Se eble, iru ien, kie vi devos paroli esperante; Universala Kongreso estas ideala, sed iu ajn renkontiĝo kun alilandanoj estas valora. Se vi mem ne povas vojaĝi, eble vi povas inviti iun viziti vin?

Ofte estas bone, en grupo, havi ian difinitan ekzercon, kiun ĉiuj antaŭpreparas. (Ekzemple, ĉiu alportu interesan objekton kaj klarigu pri ĝi). Ni ankaŭ ne forgesu, ke tre necesa parto de konversacio estas aŭskultado; ni lernas ion, ne nur kiam ni parolas, sed kiam ni atente aŭskultas kaj kutimiĝas niajn orelojn al la lingvo. Kaj ni ne forgesu, ke tiu, kiu persiste parolas nacilingve

ve en esperantista rondo ne nur malhelpas sian propran lernadon - sed malhelpas ĉiujn aliajn.

4. KONTROLU.

Sen kontrolado, abunda ekzerco povas foje nur firme enradikigi erarajn niajn mensojn! Ni ofte ne scias, kion ni ne scias. Antaŭ nelonge, mikomencis skribi pri la floro, "irisso" sed kontrolis en PIV - feliĉe! La floro estas irido; irisso estas ja esperanta vorto, sed nomas parton de la okulo.

Mi estas sperta verkistino, akademiano, kiu jam aperigis 11 librojn en Esperanto. Mi ĵus finverkis legolibron, ĉirkaŭ 100.000-vortan. Sentante la specialan devon, ne instrui erarojn al lernantoj, mi kontrolis en PIV la precizan signifon kaj ĝustan uzadon de ĉirkaŭ ĉiu dudeka, foje ĉiu deka, vorto; do almenaŭ 5000 vortoj. Kaj tiel mi, kiu iom scipovas Esperanton, tamen savis min kaj miajn legantojn de eble 300 eraretoj. Do, ni ĉiuj multe kontrolu en vortaroj, se eble en PIV, se ne eble, almenaŭ en la tre bona Plena Vortaro (kun Suplemento), en nacilingvaj vortaroj, kaj foje en libroj pri gramatiko. Granda parto de progreso en iu ajn fako estas ia malvido al nia propra scio, ia preteco ankoraŭ lerni.

5. Servu!

Estas konata paradokso en homaj rilatoj, ke ni ofte plej amas tiujn, al kiuj ni bonfaras - pli ol tiujn, kiuj bonfaras al ni. Ni pli bone ellernas nian lingvon, kiam ni servas ĝin; Laborante por ĝi, ni trovas ĉiam freŝajn motivojn por plikaj pli esplori ĝin. Talentoj vari-

as: unu instru, alia propagandu, unu organizu grupan bibliotekon, alia kantu en koncertoj, alia traduku; sed ĉiu povas trovi ian personan kapablon fari ion utilan. Kaj la neceso, uzi la lingvon por praktikaj celoj, aŭ defendi ĝin, kaj klarigi pri ĝi, devigas nin ellerni ĝin.

Oni ofte miskomprenas la tute veran aserton, ke "Esperanto estas facila." Ĝi ne estas absolute facila, kiel estas lalkado de glaciaĵo. Ĝi estas facila lingvo, kaj iu ajn lingvo estas sufiĉe komplika studobjekto. Kompare kun naciaj lingvoj, Esperanto estas miraklo de facileco, logiko, fleksebleco, konsekveneco, libereco; ĝi levas facilecon al la nivelo de ia estetika kvalito, ia unika beleco. Sed ni neniam forgesu, ke tamen ni devas vere lerni ĝin; ĝi ne estas la limigita kodo de kelkaj utilaj frazoj, sed plene vivanta moderna lingvo; ĝi estas multe tro valora, por ne postuli ian penadon. Sed, dum en multaj lingvoj parkerigendaj konjugacioj kaj miloj da anomalioj nenecesaĵas tudas nin, en Esperanto ĉio lerninda estas io lerninda, kiupliriĉigas ni-

an esprimkapablon.

Antaŭ nelonge, bonagazeto, kiu konsideris min kiel estontan kontribuanton, sendis al mi enketilon, sur kiu staris la jenaj demando: mi devis indiki la nivelon de mia lingvoscio per kruĉeto ĉe unu el tri vortoj:

"mi regas Esperanton lege kaj skribe

perfekte
bone
mezbone"

Mi post hezito aldonis -ge al bone, markis ĝin per kruĉo, kaj skribis apude:

"Neniu rajtas diri, perfekte!"

Sed tiu ĉi diro ankaŭ signifas, ke neniu devas stagni; ni ĉiuj povas progresi senfine. Se ni ne penas por progresi, ni baldaŭ malprogresas; sed kiam ni konstante penas progresi, ni konstante ĝojas pro etaj venkoj. Ĉiu el ni povas elekti: ĉu esti esperantisto aŭ nur ekesperantiĝinto; ĉu paroli Esperanton aŭ Espereranton; ĉu konstante krei por aliaj tedojn, aŭ konstante krei por si mem etajn triumfojn.

NEKROLOGOJ

FR-Germanio

La 18an de Julio 1980 forpasis d-ro WILHELM LANG en aĝo de 69 jaroj. Li esperantiĝis en 1952 kaj havis gravajn funkciojn en GEFA.

Ni kondolencas al la familioj de niaj forpasintaj kolegoj.

IFEF

Ĉeĥoslovakio

Mortis nia kolego fervojist-lokomotivestro JAROSLAV JESTRAB el Ĉeske Budějovice. Esperantiĝis en la jaro 1950. Nun li havis 66 jarojn.

ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

La 18an de majo okazis en la vico jam pokvarfoje, marŝo kiu nomiĝas "Post la trebovski virkoko" aranĝita de sport-rondeto "Lokomotivo" en Ĉeska Třebčv.

Tiun jaron ĉeestis 2.620 pilgrimantoj el diversaj lokoj de la tuta ĈSSR. Ankaŭ laŭ la laborplano ĈS FEF partoprenis niaj anoj ĈS FEF. Pilgrimantoj aliĝis laŭ siaj propraj decidoj kaj ĉefe fortoj je: 15, 25 kaj 50 kmjn damarŝo tra la naturo. Post la tre pluva pasinta nokto, la vetero tiun tagon estis tre agrabla: nek varma, nek malvarma.

Post certaj kilometroj da marŝado aperis kiel oazo kontrolstacio, kie ĉiuj alvenintaj

pilgrimantoj ricevis en siajn listojn stampilon, kiu prezentis malnovan, sed belan vaporlokomotivon, kaj ankaŭ libervole oni povis refreŝigi per teo. Entute estis kvin kontrolstacioj, ĉiam stampilo prezentis alian tipon de malnova kaj historia vaporlokomotivo. Revenante al celo post la fino de la marŝo, ĉiuj ricevis diplomon kaj medalon.

Ni esperas, ke tiuj marŝoj enskribitaj en nian laborplanon estas ankaŭ unu el multe da aliaj formoj, kiel ekkoni ne nur aliajn ĉirkaŭaĵojn de la lando, sed ankaŭ sisteme kunlabori kaj disvastigi esperantistan ideon inter ĉiuj fervojistaj institucioj.

En majo 1980 oni kreis en orient-slovaka regiono Esperanto-konferenco "Fervojistansekcio" en Košice. Ĝi estas gvidata de S-ino A. Jablonovská. Kiel sekretariino funkcias M. Černáková.

La oficiala adrese estas:

Fervojista sekcio,
str. Svermová 35/L,
Košice 040 01, ĈSSR - SSR.

En slovaka Enciklopedio, dua volumo (paĝo 47) estas menciita, ke nia amiko St. Seemann, Bratislava, estas la aŭtoro de vortaro Slovaka-Esperanta kaj Esperanta-Slovaka.

Ĝojiga estas la fakto, ke kvankam nur post 10 jaroj oni nun agnoskas oficiale la verkon kiel literaturan kontribuon de fervojistoj

Al S-ro Seemann ni gratulas.

La XVa jubilea tutŝtata konferenco ĈS FEF (Ĉeĥoslovaka Fervojista Esperanto Federacio) okazas la 6an de decembro 1980 en Prago.

Interesuloj skribu al sekva adreso:

ĈS FEF - LKK, P.K. 342, ĈS 111 21 Praha 1 - Ĉeĥoslovakio.

PASPORTA SERVO - rekorde ampleksa

La ĵus aperinta listo de gastigantoj estas rekorde ampleksa. Ĝi donas la eblecon al junuloj kaj fakte al ĉiuj malmultekoste sed inde turismi, per listigo de esperantistoj, kiuj prete senpage gastigi vojaĝantajn esperantistojn (minimuma kontribuo povas esti petata por manĝoj). Malfermaj pordoj estas tiel troveblaj tra la tuta mondo.

Inter 1975 kaj 1980 la nombro de gastigantoj en la Pasporta Servo de TEJO kreskis de 97 ĝis 360. La nombro de landoj, kie troveblas gastigantoj simile kreskis de 32 ĝis 48.

La nova listo, kiu unufoje enhavas ankaŭ mapojn, estas aĉetebla ĉu de:

J.-M. Cash, 9, rue du Languedoc,
F-78690 Les Essarts-le Roi, Francujo,

kontraŭ 15 francaj frankoj aŭ irkp. (p&k. 25 426-58 Paris);
ĉu de la libroservo de UEA (inkluzive aliĝen) kontraŭ 7.50 gld.



Gravaj enhavaĵoj

	paĝoj
La 33a IFEF-kongreso	75
Kiel ni altigu la nivelon de nia lingvoscio	80

La redaktotino por la venonta IF estas 15.11.80.



Preso: Esperanto-Centro Aarhus, Dk-8000 Århus C